# Sennacieca Revuo n-ro 148 2020

Sennacieca Asocio Tutmonda




Supplément au n° 11-12 (1385-1386 )
de Sennaciulo

ISSN 1248-2293

*Sennacieca Revuo* estas eldono de SAT

**Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio
Telefono: (+33) 09 53 50 99 58
kontakto@satesperanto.org
www.satesperanto.org
Poŝtkonto: SAT n-ro 1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064; BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
Prezidanto: Vinko Markovo
Vic-prezidanto: Pedro Sanz
Sekretario: Diana Riŝar
Kasisto: Bruno Henry
Vic-kasisto kaj eldonestro: Guy Cavalier
Ceteraj membroj: Paz (Jung Hyunsoo), Dieter Rooke, Dominiko Simeone
Reprezentantoj de SAT en la LEA-Komitato: Paz kaj Dieter Rooke

***Sennacieca Revuo***
Redaktoskipa kunordiganto: Vinko Markovo
Enpaĝiganto: Serĝo Sir'
Ceteraj redaktantoj: Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcelo Redulez, José María Salguero (Kani), Pedro Sanz, Rikardo Schneller, Franciska Toubale

*Kontribuojn por ambaŭ gazetoj sendu*
*elektronike al*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent-Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Publikigo de artikolo ne signifas, ke ĉiuj redaktoskipanoj konsentas pri ĝia enhavo.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROIS A, 4 rue Théodule-Ribot, FR-75017 Paris.
Parution annuelle. *Aperas ĉiujare.* Le directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel — *Jara abono*: Francio 39 eŭroj
Autres pays — *Aliaj landoj*: vidu la detalojn en la kotiztabelo presita en *Sennaciulo*.
Dépôt légal à la date de parution: n-ro CPPAP 0525 G 86567

Suppl. au n° 11-12 1385-1386 de *Sennaciulo*

# Enhavtabelo


| | | |
|---|---|---|
| 1 | **Enkonduka bildo al «La laborista komponanto de la esperantismo» (vidu sube)** | |
| 2 | **Kolofono** | |
| 4 | **Enkonduko** | *Redaktoskipo* |
| 5 | **Tragedio de anarkia bolŝevisto** | *LI Danyang kaj LIU Jian* |
| 12 | **50-a datreveno de la Hispana Revolucio** | *Eduardo Vivancos* |
| 20 | **Morgaŭ matene** | *Anne Wadman* |
| 24 | **Albanio: la sola eŭropa lando sen antisemitismo** | *Tomasz Kamusella* |
| 38 | **Atestanto de la armea urbo Hiroŝimo** | *Hori Jasuo* |
| 42 | **Historia studo pri la japana politiko pri lingvoj** | *Miyazawa Naoto* |
| 50 | **Persona bilanco pri Germana Demokrata Respubliko** | *Detlev Blanke* |
| 54 | **La laborista komponanto de la esperantismo** | *Georgo Lagranĝ'* |
| 63 | **Sennacieca Asocio Tutmonda: daŭripova renkontiĝejo por malsamideaj aktivuloj el la laborista Esperanto-movado** | *Vinko Markovo* |




**Kovrilpaĝo**

***Parto el la partoprenantaro de la 39a SAT-kongreso en Svanviko, Britio, 1966.***

***(skanita laŭ ekzemplero transdonita de Marcelo Leereveld)***

# Prezento

***La redaktoskipo***

Karaj legantoj,

Jen la numero 148 el ***Sennacieca Revuo***, kiu proponas al vi tutmondan vojaĝon tra la 20a jarcento, el la perspektivo de la laborista Esperanto-movado.

La vojaĝo ekas en Ĉinio per priskribo de la tragika sorto de la anarkia bolŝevisto kaj esperantisto Vadim Stopani en la jaro 1921. Li cetere estis inter la unuaj SAT-anoj, kaj lia nekrologo aperis en la unua numero de ***Sennacieca Revuo***, en oktobro 1921. La vojaĝo daŭrigas per rakonto pri la Hispana Revolucio de 1936, verkita de unu el ĝiaj partoprenintoj, Eduardo Vivancos. Sekvas novelo de la verkistino Anne Wadman pri la situacio en Frislando post la Dua mondmilito, en traduko de Sipke Stuit. Daŭre pri la Dua mondmilito, sed el vidpunkto de Albanio, en teksto de Tomasz Kamusella tradukita de Bardhyl Selimi. Fine, pri la azia flanko de la Dua mondmilito alportas informojn la atesto de travivinto de la bombado en Hiroŝimo, tradukita kaj prezentita de Hori Jasuo. La japanan lingvan politikon, en rilato kun la situacio de la ajnua minoritato, priskribas la kontribuo de Naoto Miyazawa. Pri la jaroj de la malvarma milito travivita en Germana Demokratia Respubliko rakontas letero el 1991 de Detlev Blanke. Alia retrovita manuskripto, el la tajpmaŝino de Georgo Lagranĝ', iam regula kontribuanto al ***Sennacieca Revuo***, donas vidpunkton pri la historio de la laborista Esperanto-movado, ĉi-foje el okcident-eŭropa perspektivo, ĝis la jaro 1985. La tridekkvin lastajn jarojn en la vivo de SAT ĝis la nuna tempo traktas, kun provo iom tutmondigi la rigardon al la antaŭaj periodoj, skizo de Vinko Markovo.

***La redaktoskipo***

# Tragedio de anarkia bolŝevisto

*LI Danyang kaj LIU Jian*

Vespere je la 8a horo de la 29a de februaro 1920 la mallumo regas Ŝanhajon, kaj lampo lumiĝas en granda ĉambro de 1746 Siĉuan-Strato Norda. La ĉambro estas plena de ĉirkaŭ 40 dungitoj de ŝipkompanioj kaj havenstokejoj. Al tiuj malfeliĉaj ĉinoj prelegas juna fremdulo Esperante..

La prelego estis notita en informa suplemento de policejoj de la koncesia laborburoo kaj brita informsekcio en Ŝanhajo. La malnovaj arkivoj notis la nomon de la prelegintо Vadim A. Stopani, junulo el Rusio. La arkivo notis la ĉef-enhavon kaj programon de la kunveno. Per ĝi oni povas ŝajne vidi la okazon antaŭ pli ol okdek jaroj.




Funebra anonco: sro Vadim Stopani instruisto de nia asocio malfeliĉe forpasis ptm. je la tria horo de la 28a de Marto, 1921 en Shanghai Ĝenerala Hospitalo. Ŝanhaja Esperanto-Asocio

Stopani prelegas flue: Ŝanhajo estas granda centro de industrio. Ĉi tie la laborista klaso suferas ekspluaton teruran, kaj la plej multaj pezlaboras 14 horojn kaj gajnas malpli ol dekonon de sia laborprofito. La kapitalisto riĉiĝas de la ekspluato kontraŭ la laboristo, kaj per la nejustaj profitoj laŭplaĉe aĉetas aŭtomobilon, kaleŝon kaj ceterajn luksaĵojn. Tia situacio jam daŭras longan tempon.

Prelegante, Stopani rekte traktas sian temon: nur importi kaj apliki la komunismon estas unika rimedo forigi tian situacion. Sekve li klarigis komunismon, kaj koncize rakontis sukcesan aplikon de la komunismo en Rusio. Li diris al la aŭskultantoj: «Antaŭ ol apliki la komunismon en Rusio, la rusiaj laboristoj samis kiel la servutuloj, sed nun ilia socinivelo similas al tiu de pasintaj kapitalistoj kaj nobeloj». Plie li agitis per la diro, ke «se ŝanhajaj laboristoj deziras unuiĝi kaj batali, tiel ni kredas, ke ankaŭ vi povos uzi la saman rimedon por altigi la socinivelon kaj vivstaton». Fine, li proponis al la ĉeestantoj lerni Esperanton, konvinkante, ke posedo de Esperanto povas akceli la internaciismon kaj komunismon.

La prelegon de Stopani interpretis ĉinlingven ĉina esperantisto LU Shikai (Lu Ĉiĉin), kaj donis al la aŭskultintoj revoluciemon kaj lernemon de Esperanto. Post la prelegado dum horo kaj duono Stopani donis la ruĝfonan flagon kun verda stelo brodita sur blanka kvadrato oficiale al s-ro ZHANG Futang ĉefiniciatanto de Ŝanhaja Ligo de Ŝipserva Laboristaro. La verda stelo estas simbolo de la Esperanto-movado, kaj la ruĝa flago estas tiama simbolo de revoluciaj socialismo kaj komunismo.  En Ŝanhajo tio estas unua okazo propagandi publike al ĉinoj la komunismon kaj la rusian rimedon kontraŭ la kapitalistoj.

Tia prelego timigis la instancon de la ŝanhaja koncesio. Sekvan tagon (1a de marto), polica agento de la Ŝanhaja Laborburoo minacis al Stopani areston kaj deportadon, se li refoje propagandos la komunismon kaj agitos ĉinojn kontraŭ ties dungantoj. Fakte, ekde februaro 1920 la koncesia polico kaj la sekcio pri fremdaj spionoj jam atente enketis pri la Esperanto-vesperkurso de la Lernejo Xinhua en Gongyi-kvartalo de Siĉuan-Strato Norda en Ŝanhajo.

Esperanto estis kreita de la pola doktoro L. L. Zamenhof, miksita el lingvoj latina, latinidaj, angla kaj germana en la jaro 1887. Post la publikiĝo ĉi tiu relative facile lernebla artefarita lingvo rapide disvastiĝis en Eŭropo, precipe interesante tiujn, kiuj batalas por liberigi la laboristan klason. Iuj ŝtataj kaj internaciaj Esperanto-organizoj estis ĝenerale kontraŭ la kapitalismo kaj militarismo, kaj por la internaciismo, socialismo kaj liberpenso. Esperanto havis gravan funkcion en la internaciaj laboristaj organizoj kaj kongresoj. Post la Oktobra revolucio Esperanto iam estis rimedo de la soveta Rusio por akiri internacian helpon. La soveta Rusio iam esperis, ke la internacia Esperanto-movado sekvos la moskvan politikan linion. En la jaro 1921 speciala komisiono de la Internacio decidis alprenon de Esperanto kaj simpligita Esperanto kiel internacia lingvo (sed tio ne estis akceptita de la Internacio mem).

En la fino de la 19a jarcento Esperanto estis portita de la rusia Vladivostoko en Ĉinion, kaj ĉinaj anarkiistoj por internaciismo kaj mondismo (kosmopolitismo) fervore lernis kaj uzis Esperanton, fondante Esperantajn institutojn, lernejojn kaj asociojn, redaktante kaj eldonante interalie revuojn kun Esperanto. Konklude, dum la jaroj 1919-1920 la ĉina Esperanto-movado estis ankaŭ malgranda. Pro tio, Esperanton propagandis kaj instruis energie Stopani, kiu sincere taksis Esperanton kiel ilon por forigi la homarajn konfliktojn kaj realigi la mondan unuiĝon. Alveninte Ĉinion, li tuj volonte instruis en sia loĝejo, poste fondis Esperanto-lernejon por senpage instrui al pli multaj homoj Esperanton.

La Esperanto-vesperkurso ĉe Lernejo Xinhua nomiĝis ankaŭ Esperanto-Lernejo Xinhua. Komence, tri vesperojn de ĉiu semajno okazis leciono kun ĉirkaŭ 30 lernantoj, kaj poste okazis dumtaga kurso por lernantinoj. Ĝis la somero de la jaro 1920 ĝi atingis pli ol cent lernantojn. La 3an de Majo 1920 en la *Ĵurnalo de la Ĉina Respubliko* aperis anonco «Peranto de la monda unuiĝo», en kiu estis skribite, ke Esperanto estas ŝparvojo por amikeco, senklasigo kaj akademio, kaj estu komuna lingvo lerninda de ĉiuj, kaj ke ĝi estas bonvenigata de ĉiuj dezirantoj de monda unuiĝo, libereco, egaleco, interhelpo k.a.; invitante al ĉiuj lerni Esperanton en Lernejo Xinhua. Por pli bone disvastigi Esperanton, Esperanto-lernejo Xinhua pli varbis kursanojn de la diversaj lernejoj dum la feriado. La 26an de Januaro 1921 en la *Ĵurnalo de la Ĉina Respubliko* aperis reklamo: LU Shikai, WANG Kesui, Stopani k.a. speciale instruos Esperanton dum la vintra ferio. La instruado okazos posttagmeze de la 1a horo kaj duono ĝis la 3a, kaj oni instruos ankaŭ en la dimanĉo. Ĉiuj estas bonvenaj sen pago. Krom la instruado en Lernejo Xinhua, Stopani instruis Esperanton ankaŭ en Ŝanhaja Korea Lernejo. Post la klopodo li rapide ekkonis kaj kolektis multajn esperantistojn ĉinajn, koreajn kaj eŭropajn en Ŝanhajo. Surbaze de tio li alvokis refondi la Ŝanhajan Esperanto-Asocion.

Okaze de la instruado de Esperanto, Stopani ofte propagandis la teorion de la komunismo kaj la staton de la soveta Rusio. La lernejo ankaŭ uzis tiaman kuriozan diaskopon por interesi aŭskultantojn, ekzemple unu tagon de Junio 1920, ĉirkaŭ 60 ĉeestintoj aŭskultis prelegon pri la valoro de libereco faritan de s-ro ZHANG Mochi, esperantisto kaj studinto reveninta el Japanio, rigardante klarigan projekciaĵon de diaskopo. Li prelegis: la nuntempa malfeliĉa stato de la ĉina laboristo estas kaŭzita de la premo de la kapitalistoj kaj manko de libereco. La laboristoj germanaj, rusaj kaj usonaj jam akiris egalan pozicion kiel la

kapitalistan, sed tia pozicio estas akirita post obstina batalado. Se la ĉinaj laborantoj volas plibonigi sian situacion, ili devas faligi la kapitalistojn. Se necesas, ili devas esti pretaj riski sian vivon por akiri tian pozicion. Se la popolo ne perfortos, certe ĝi neniam akiros bonajn loĝejojn, edukon kaj vestaĵojn. Kongrue kun la prelego estas projekciaj bildoj kun fotoj de socialismaj gvidantoj rusaj, germanaj, japanaj kaj usonaj, ankaŭ fotoj de laboristaj loĝejoj k.a. en Germanio kaj Rusio. La prelego kaj projekciaj bildoj donis al la aŭskultintoj impreson eksterordinare novan kaj freŝan.

Vespere de la Nacia tago, la 10an de Oktobro 1920, en la ĉine regita distrikto de Ŝanhajo iu aŭto veturis laŭ stratoj disdonante ruĝajn presaĵojn kun titoloj *Damninda Privat-proprietaĵo*, *Popola Revolucio* k.a.; ekzemple en unu flugfolio estis skribite: «Ĉu vi scias, ke la rusia revolucio jam sukcesas tri jarojn? Kvankam Rusio ankoraŭ ne realigas plenan anarkiismon, tamen la rusia popolo jam havas vivon liberan, egalan kaj feliĉan. […] Alilandaj laborantoj ankaŭ pretas batali kontraŭ la regantoj kaj kapitalistoj. […] Se vi volas havi veran feliĉon, vi devas rapide ribeli por renversi la registaron.» Sekvan tagon, la polico arestis la junulon HU Jiating, instruisto de Esperanto-Lernejo Xinhua kaj membro de anarki-komunista societo. En lia loĝejo la polico elserĉis kelkajn abonleterojn por bolŝevismaj propagandaĵoj kaj libroj. HU Jiating konfesis, ke la flugfoliojn disdonis li kune kun sia frato kaj lernanto de Esperanto-Lernejo Xinhua, ankaŭ ke li havis rilaton kun la komunisto-anarkiisto ZHENG Peigang. Plie, ankaŭ la rilato inter li kaj Stopani estis malkovrita. Refoje Stopani kaj lia Esperanto-Lernejo Xinhua fariĝis rimarkindaj ĉe la ŝanhaja polico. Fakte, pli frue, en Februaro 1920, kiam la polico sekrete pridemandis la esperantiston LU Shikai (Lu Ĉiĉin), LU konfesis sub polica premo, ke li kaj aliaj kolegoj de la Esperanto-Lernejo laboras por la bolŝevismo; kiam la lernantoj povos legi Esperanton, ZHENG Peigang povos alsendi de Kantono (Guangzhou) pribolŝevismajn librojn cele, ke ili legu. Pro tio, ke la flugfolioj disdonitaj de HU Jiating kaj la kantonaj presaĵoj de ZHENG Peigang ĉefe estas propagandaĵoj pri la anarkia komunismo, la polica notaĵo ne estas tute kredinda, konsiderante, ke la polico ŝatis trakti ĉiajn revoluciajn propagandaĵojn kiel bolŝevismaĵojn. Sed ni ne dubas, ke en tiaj presaĵoj estis propagandaj broŝuroj pri la soveta Rusio kaj vera bolŝevismo. Precipe en la somero de la jaro 1920 en Ŝanhajo, ZHENG Peigang fondis presejon Renova, en kiu investis la Komunista Internacio, kaj post tio la propagando de la bolŝevismo kaj anarkia komunismo komencis havi regulajn monrimedojn.

Ĉu oni ne komprenas, kial tiuj anarki-komunismaj esperantistoj LU Shikai, ZHANG Mochi, ZHENG Peigang, HU Jiating k.a. povis labori por la bolŝevismo? Kia estis Stopani, kiu intime kunlaboris kun tiuj personoj? Kio estis lia celo, aktivante en Ĉinio? Por respondi tiujn demandojn, ni devas koni la devenon, karieron, penson kaj kredon de Stopani.

Stopani estas italdevena, naskita en Rusio. Lia patro estis soveta ĉefestro de rusia regiono. Kvankam Stopani kredis je la anarkiismo, tamen li subtenis la bolŝevisman revolucion. En la vintro de la jaro 1919 li venis de Kaŭkazo en Ĉinion, kaj laboris kiel statistikisto de preseldona kompanio de la ruslingva ĵurnalo *Ŝanhaja Vivo* (*Шанхайска Жизнь*), kaj ankaŭ kromlaboris kiel ĵurnalisto de la ĵurnalo. La ĵurnalo *Ŝanhaja Vivo* fakte estis bolŝevista organo kaj instanco grava en Ĉinio. Sub ĝia vualo en Majo de la jaro 1920 establiĝis la orientazia sekretariejo de la Komunista Internacio. En ĝi kiel publika redaktoro laboris la rusia kompartiano Grigori Naŭmoviĉ Voitinskij (Г. Н. Воитинский), kiu venis Ĉinion kvazaŭ ĵurnalisto de la ĵurnalo *Ŝanhaja Vivo* cele fondi la ĉinan kompartion. En la sama ĵurnalo ankaŭ Stopani laboris fakte por la soveta Rusio kaj la Komunista Internacio.

Stopani konfesis en sia letero publikigita en la n-ro 31 de la semajna gazeto *Popola Voĉo*

en 1921, ke li estas «bolŝevisto», ankaŭ deklarante sin «absoluta anarkiisto». Traktante la ŝajnan dilemon je sia sinteno, li klarigis: «Mi kredas, ke la vera feliĉo kaj libereco okazos nur en la anarkia socio … sed por realigi la celon, ni devas iniciati diversajn movadojn, kaj necesas sperti tiom da malfaciloj; certe ne eblas atingi per unu salto. […] Lenin ankaŭ ne konsentas esti kontraŭ la anarkiismo, sed tre kredas ĝin realigebla. Sed la anarkiismo taŭgas por alpropagandi kaj veki senkonsciajn popolojn, kaj ne taŭgas por la revolucio. […] En la *Manifesto de la komunista partio*, ilia celo estas preskaŭ sama kiel la celo de la anarkiismo. Ili prenis tiun el la popolaj rimedoj ĉe okazo, en kiu pli da rusaj popolanoj ankoraŭ ne havas konscion, ke anoj de malplimulto hazarde akiris la ŝtatregadon. Pro tio ni ne devas kulpigi la rusian revolucion…». Li precipe indikis, ke la anarkiisto devas unue subteni la bolŝevistan movadon, ĉar la bolŝevismo povas atingi unuan etapon de nia celo.

Stopani estis anarki-bolŝevisto samideala kiel multaj rusiaj anarkiistoj aliĝintaj al la bolŝevista partio, kiuj sindonis al defenda batalo por la soveta reĝimo en la Oktobra revolucio kaj la rusia interna milito. En Ĉinio li laboris por la bolŝevista ĵurnalo, propagandis ankaŭ la norman komunismon kaj anarki-komunismon plejeble, kaj persvadis ĉinajn anarki-komunistojn esperantistojn kunlabori kun la bolŝevistoj. Post la Oktobra revolucio, la bolŝevistoj iam kunlaboris kun alilandaj organizoj de la anarkiismo kaj anarki-sindikatismo. La Plenuma Komitato de la Komunista Internacio eĉ deklaris, ke ĝi tre sincere invitu ilin aliĝi al la ĝenerala movado de la internaciaj revoluciuloj kaj la soveta komunismo. Kaj en la invitletero al la Industria Laboristaro de la Mondo (IWW) kadre de la usona anarki-sindikatismo aliĝi al la Komunista Internacio, ĝi skribis, ke «nia celo estas sama kiel la via konstrui tian socion sen la ŝtato, registaro kaj klasoj. En tia socio la laboristo administros la produktajn rimedojn kaj distribuos por la feliĉo de la tuta popolo.» Kvankam tio estis portempa rimedo de la bolŝevistoj cele konkurenci kun la Dua Komunista Internacio, kaj por akceli la mondan revolucion kaj frakasi la fremdan intervenon kaj la sieĝon de kapitalismaj ŝtatoj kontraŭ la soveta Rusio, tamen tia kunlaboro fakte havis praktikan bazon kaŭze de komunaj finaj celoj, ekzemple, ke «ĉiu faru sian plejbonon, prenu sian bezonan», «unuiĝo de liberalaj kaj emancipiĝaj homoj» kaj la sama klasbatalo kontraŭ la burĝaro, la reakcia ŝtatreĝimo ktp. En la tiama Ĉinio ankoraŭ ne ekzistis la marksismo, kiam ĵus alvenis la bolŝevisto, kaj diversaj kluboj de la ĉina anarkiismo havis simpation kaj subtenemon al la Rusia revolucio.

Pro tio la bolŝevisto povis facile kunlabori kune kun ĉinaj anarkiistoj. Stopani kiel anarki-bolŝevisto nature deziris kunlabori je iu ajn idealo. Sub konduko de la bolŝevisto, ĉinaj anarkiistoj ankaŭ deziris laŭ la situacio kunlabori por realigi la unuan celon de la anarkiismo: renversi la kapitalistojn kaj la registaron, helpe de la rusia bolŝevisto kaj ĉinaj sekvantoj. Por tiu celo ili fondis sian organizon Socialisma Federacio. Printempe de la jaro 1920, Esperanto-Lernejo Xinhua gvidita de Stopani kaj LU Shikai fariĝis peranto inter la ŝanhajaj bolŝevistoj kaj generalo CHEN Jiongming de la Ĉina Naciisma Partio en la urbo Zhangzhou, tendencanta al la socialismo kaj revolucio de la soveta Rusio, kaj ankaŭ anarki-bolŝevista centro nomita de la brita spiona sekcio, kolektanta anarki-komunistojn el diversaj regionoj de Ĉinio. Dum Aprilo aperis anonco en la ĵurnalo *Fujian-a Stelo*, alvokanta ĉinajn dezirantojn aliĝi al la bolŝevista organizo letersendi al s-ro LU Shikai, 150a Poŝtkesto de la Ŝanhaja Poŝto, cele registriĝi.

La tiama Ŝanhajo estis loko, en kiu prepariĝis la ĉinaj kompartio kaj organizo. En Februaro 1920 la profesoro CHEN Duxiu de Pekino vizitis Ŝanhajon. Per sia vizito al la suda Ĉinio li ne nur fuĝis de severa gvatado post sia liberiĝo el malliberejo, sed ĝi okazis ankaŭ pro tio, ke Ŝanhajo estas ĉina industria centro kaj la ĉefurbo de la ĉina laborista klaso. Laŭ la *Konciza historio de la ĉina kompartio*, la fondinto CHEN Duxiu «profunde sciis la gravan

konekson inter la kompartio kaj la laborista organizo», kaj pro tio «prenis Ŝanhajon kiel bazlokon de la laborista movado kaj sia aktivado». S-ro ZHANG Guotao ankaŭ konfesis, ke li iam aliĝis al sindikato por trovi laboristojn taŭgajn por prepari kompartion. Ankaŭ CAI Hesen diris, ke la Ŝanhaja vizito de CHEN Duxiu «estis planita». La «plano» fakte apartenis al kompleta projekto de la bolŝevisto en Ĉinio por establi sekretajn sekciojn en Ŝanhajo, Tianjin k.a. La 2an de Aprilo 1920 CHEN Duxiu kun LI Hanjun, SHEN Xuanlu, SHEN Zhongjiu k.a. ĉeestis starigan kunvenon de la Ligo de la Ŝiphavenaj kaj Stokaj Laboristoj en Ŝanhajo (LŜLŜ). Tio estis la unua fojo, ke gravuloj preparantaj la proletan partion aperis publike en sindikata aktiveco. Tiuokaze CHEN Duxiu prelegis pri la laborista movado je la unua etapo plibonigonta la laboristan staton kaj je la dua, en kiu la laboristo prenu administran rajton. Tio estis lia plej frua grava deklaro pri la laborista movado. Kaj ĉi tiu LŜLŜ kiel unu el plej fruaj bazlokoj laboristaj por CHEN Duxiu k.a. en Ŝanhajo stariĝis danke al Stopani kaj ĝia organizanto ZHANG Futang. Kaj Stopani ankaŭ propagandis komunisman revolucion dum ĝia preparo. Certe, tia propagando kaj aktivado far Stopani al ŝanhajaj laboristoj estis parto de la preparo por naski la ĉinan kompartion.

Stopani ankaŭ aktive kontaktis gravajn respondeculojn de diversaj tutlandaj asocioj, precipe laboristaj kaj edukaj el la movado de la 4a de Majo, kaj kuraĝigis diversajn asociojn reagi al la unua deklaro far Karaĥan (Лев Михайлович Карахан) al Ĉinio, kaj plie amikiĝi kun la soveta Rusio, kaj fari komunajn organizojn. En spiona raporto de la ŝanhaja polico, la 11an de Aprilo 1920 okazis diskutkunveno por akcepti «Leteron al la registaroj kaj popoloj de la norda kaj suda Ĉinio», kiun ĉeestis reprezentantoj CHEN Jianai, XIA Qifeng, MING De, YAO Zuobin k.a. nome de Ĉina Ligo de Diversaj Asocioj, Ĉina Ligo de Studentaj Organizoj, Samideana Asocio de la Ĉinaj Laboristoj k.a. Ankaŭ Stopani, Botapov, LU Shikai k.a. ĉeestis ĉi tiun kunvenon. La ĉeestantaro tute akceptis la rusian telegram-leteron kaj decidis, ke se la Pekina registaro ne akceptos, en Ŝanhajo ili organizos «Kvarlandan Ligon de Ĉinio, Japanio, Rusio kaj Koreio» cele unuigi la kvarlandajn popolojn por renversi la militaristojn kaj por kune ĝui la liberecon, egalecon, interhelpon kaj feliĉon. Koincide, la 3an tagdekon de Marto 1920 en la ĵurnalo *Ŝanhaja Vivo* aperis artikolo indikanta komunan sorton de Ĉinio, Japanio kaj Koreio, kaj proponanta Rusion kiel modelon por ilia liberigo. Tio ŝajne koincidis kun la preparo de «Kvarlanda Ligo de Ĉinio, Japanio, Rusio kaj Koreio».

Ŝanhaja memorkunveno por la monda laboristaro okaze de la 1-a de Majo 1920 estis unuafoja komuna aktiveco de markismemaj intelektuloj kaj anarkiistoj por la internacia laborista tago la Unua de Majo. Inter la sep laboristaj organizoj kaj en la komuna deklaro «Respondo al la deklaro de la soveta rusia registaro» de ĉi tiu kunveno estis la Ligo de la Ŝiphavenaj kaj Stokaj Laboristoj en Ŝanhajo (LŜLŜ), kiun helpis fondi Stopani. Lia intima kontaktito ZHANG Mochi prelegis malgraŭ ĉio, prezentante sin tre elstare.

La «Fremdlingva instituto» starigita somere de la jaro 1920 en Ŝanhajo estis lernejo fondita de la Orientazia Sekcio de la Komunista Internacio por trejni kandidatajn lernantojn por la soveta Rusio, kaj samtempe ĝi estis centra oficejo de la Ĉina Socialisma Junularo. Stopani ne nur instruis al iuj lernantoj Esperanton senpage, sed ankaŭ fervore kuraĝigis lernantojn viziti kaj lerni en la soveta Rusio, dirante: «la soveta rusia registaro bonvenigas la lernantojn», kaj li mem skribis rekomendajn leterojn por iuj lernantoj. Inter liaj rekomenditoj lernantaj en la Orienta Laborista-Komunista Universitato estis LIAO Huaping, QIN Huiseng, XU Dunrang kaj DU Xiaoma, kiuj pretendis en Moskvo, ke ili fondis Siĉuan-provincan komunistan organizon en Marto de la jaro 1920. S-ro SHI Cuntong, unu el la kunfondintoj de la ĉina kompartio, rakontis pri la Ŝanhaja Fremdlingva

Instituto, indikante, ke la Esperanto-lernejo en la franca koncesio estis alia lernejo propagandanta la ismon. Li kaj XIE Jinqing eĉ estis por Japanio perantoj por la revuo *Liberalo* de la anarki-komunista organizo (Esperanto-Lernejo Xinhua estis ĝia eksteraĵo). En Esperanto-Lernejo Xinhua ne nur aktivis esperantistoj kaj anarkiistoj, sed en la lernejo invitite prelegis ankaŭ CHEN Duxiu kaj SHEN Xuanlu, kiuj tiam okupiĝis pri la fondo de la ĉina kompartio.

Stopani energie laboris la tutan tagon en Ŝanhajo, kaj lia afero ankaŭ prosperis kiel li esperis. Imprese ĉe la kolegoj kaj lernantoj, li estis gaja kaj optimisma junulo entuziasma pri sia afero. Opinie de la polico, li ne kondutis kiel agento de la soveta Rusio, sed estis radikala utopiulo kiel oratoro en Hyde-Parko. Tiam neniu dubis, ke antaŭ ĉi tiu revanta junulo estos longa vojo. Sed, matene de la 27a de Marto 1921, en la domo 2098 de la strato Huade D.X. abrupte krakis kelkaj pafoj. Post kiam eŭropa policisto de la policejo Huishan alkuris al la okazejo, li vidis junan fremdulon falintan en sangaĵo, kun kvar pafvundoj je la kapo. Ĉi tiu forte alpafita junulo mortonta estis tuj sendita al la hospitalo Gongji (Shanghai General Hospital). Finfine, pro senefikeco de urĝa savo la junulo mortis en la sekva tago. Post la enketo la mortinto montriĝis esti Stopani. Laŭ la konkludo pro enĉambre restintaj testamentoj al siaj gepatroj kaj gefratoj kaj sespafa pistolo ĉe si, li mem plej verŝajne mortigis sin.

La abrupta sinmortigo de Stopani forte surprizis liajn kolegojn kaj amikojn. La 10an de Aprilo 1921, Ŝanhaja Esperanto-Asocio kun kelkdek membroj aranĝis funebran ceremonion de Stopani en la patriota virina lernejo de la strateto Tianboli ĉe la strato Haining. LU Shikai prezidis la ceremonion, kaj je tiu okazo prelegis esperantistoj ĉinaj WANG Kesui, HU Yuzhi, SU Ainan, LI Shiliang kaj korea Park Younghun k.a. Ĉiuj esprimis pri la forpaso de Stopani bedaŭron kun la trista doloro kaj estima sentimento, kaj laŭdis, ke Stopani ĉiam senlace projektis Esperanto-aktivecon kaj elspezis multan tempon kaj monon. La ĉina rapida disvastiĝo de Esperanto dependis de lia kontribuo. Ĉu oni neniel komprenis, kial Stopani sin mortigis abrupte? Artikolo «Unu sinmortiginta junulo» en la gazeto *La Voĉo de la Popolo* malkovris partan kialon: «Onidire lian sinmortigon kaŭzis spirita doloro, situacia premo kaj pleja ĉagreno». Do, kiaj spirita doloro kaj situacia premo povis doni al li mortan decidon mem fini sian vivon nur 27-jara?

Stopani eksplikis en diskutletero kun anarkiisto, kial li laboras por la bolŝevistoj, ankaŭ indikante iujn diferencojn inter la anarkiismo kaj bolŝevismo. Li skribis: la anarkiisto volas havi «plenan aŭtonomecon de la regiono kaj profesio, cele ke la regiona kaj persona spirito povos libere progresi por konstrui libere unuiĝan socion kontraŭ la centraliza ŝtato». Li opiniis, ke «se estos la potenco ĉe malmultaj kaj ĉia havaĵo en la mano de malmultaj potenculoj, tre facile renaskiĝos danĝero de la kapitalistoj». Lia antaŭsento ŝajnis realiĝi laŭ ricevita informo en la printempo de la jaro 1921.

De la fino de 1920 ĝis la komenco de 1921, parto de la rusiaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj malkontentis pro la industria stagno, rikolta redukto kaj daŭranta politiko de «militotempa komunismo» kun kazerna administrado kontraŭ la laboristoj kaj perforta rekvizicio de «resta greno» kontraŭ la kamparanoj ankoraŭ post la interna milito, kaj okazis strikado kaj ribelado, ekzemple, estis plej ekscite, ke la 28an de Februaro 1921 en la fortikaĵo Kronŝtadto ribelis ŝipsoldatoj de la Balta eskadro. Ne malmultaj ŝipsoldatoj estis profunde influitaj de la anarkiismo kaj aliaj revoluciaj idealoj kaj estis radikalaj. La bolŝevistoj de frue taksis ĝin kiel emfazan armean forton honorigatan kiel «fieron kaj gloron de la rusia revolucio». La krozŝipo Aŭrora, kiu pafis al la Vintra Palaco okaze de la Oktobra revolucio, estis elveturinta de la fortikaĵo Kronŝtadto. Sekve, tieaj ŝipsoldatoj sin ĵetis al batalo por defendi la sovetan reĝimon. Ĉi-foje la ŝipsoldata ribelo esprimis

popolan deziron por libera elekto de la sindikato, memdecida kultivado ĉe la kamparanoj, permeso de sendependa administrado de la malgrandaj entreprenoj, komerca libereco, ĵurnala libero kaj sekreta baloto elektonta la sovetan komitaton k.t.p. Sed ilia alvoko por «abolicio de la privilegio de la kompartio» kaj «soveto sen la bolŝevistoj» minacis la regadon de la rusia kompartio. La 3an de Marto 1921 okazis la 10a kongreso de la rusia kompartio, kiu akceptis «la novan politikon de la ekonomio» proponitan de Lenin kondiĉite de la aktuala situacio, ankaŭ la rezolucion kontraŭ sindikatismo kaj anarkiismo kadre de la kompartio, ankaŭ malpermeson de la aktiveco de iu ajn skolo en la kompartio. Samtempe, ekster la kongreso, la soveta rusia registaro mobilizis multajn armeojn por ekstermi «la kronŝtadtan ribelon» kun la etburĝa karaktero de spontana nefidado.

La sekva praktiko de «La nova politiko de la ekonomio», laŭ la ekspliko de Lenin, estas miksaĵo de la proleta reĝimo kaj ŝtata kapitalismo, permesanta limigitan progreson de la enlanda kapitalismo, kaj limigitan «kontribuon» al la monda kapitalismo. Okaze de la granda regreso en kaj ekster la soveta Rusio, la rusia kompartio pli centralizis la unuecon kaj potencon en kaj ekster la kompartio, cele kontraŭi la protestajn voĉojn. Ĉi tiu tendenco kaŭzis fortan proteston de la anarki-komunistaro, kiu emfazas purecon de la komunismo kaj malakceptas ŝtatan centralizismon je la politiko kaj ekonomio.

Kaŭze de tio, la soveta Rusio pli forte premis la rusiajn anarkiistojn, kaj ankaŭ la Komunista Internacio komencis emfazi unuecon en diverslandaj kompartioj, forigante antaŭajn anarkiistojn kaj aliajn el la kompartio. Tiaj nova politiko kaj artifiko influis ankaŭ al la ĉina komunisma movado, kiu komenciĝis ne longe antaŭe. La kongreso de ĉinaj komunistaj organizoj en Marto 1921 en Ŝanhajo havis la ĉeftemon «Forigu anarkiistojn el nia organizo». Ĉirkaŭ la kongreso diverslokaj socialistaj societoj estis malfonditaj unu post aliaj.

La ĉenreakcia okazaĵo en Rusio kaj Ĉinio sendube donis al Stopani fortan atakon. Laŭ lia obstina kredo al la anarki-komunismo li certe opiniis, ke «la nova politiko de la ekonomio» forlasis aplikadon de la komunismo, kaj restaŭris la kapitalismon. Pro tio li ege malesperis pri la rusia estonteco. Li ankaŭ sentis sin pereeme, post kiam la bolŝevistoj kruele premis kaj ekstermis la anarkiistojn. Li ankaŭ sentis sin tre senkapabla, vidinte la subitan disfalon de la kunlaboro inter la bolŝevistoj kaj la anarkiistoj, por kiu kunlaboro li energie laboris kelkajn jarojn. Ĉi tiu idealisma junulo naiva kaj emociema ne povis elteni en sia spirito la ĝismortan baton. Pro tio antaŭ li restis la nerifuzebla elekto de sinmortigo. Stopani senlace laboradis por sia idealo kaj kora afero en Ĉinio. Lia senlaca klopodado certe faris kontribuon por rapide disvastigi Esperanton en Ĉinio kaj por kunlaborigi la ĉinajn anarkiistojn kun la bolŝevistoj, ankaŭ por fondi la ĉinan kompartion. Tamen, kiel anarki-bolŝevisto li ne povis daŭre vivi en diversaj konfliktoj kaj severe skizoida stato, kaj finfine li havis la tragedian finon.

***LI Danyang kaj LIU Jian***

***Elĉinigis: Chielismo Wang Tianyi***

La 6an de Februaro 2020 en Siano, Ĉinio.

Retpoŝto: chielismo@qq.com